

186

STIRIO

El la enhavo:

Forpasia Eva Seemannová

Paroliga kurso

SET Lančov

ILEI-konferenco

Libroservo

Esperanto-muzeo

Ĉu ni maljuniĝos?

Biblioteko en Opava



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Eva Seemannová
21.3.1920 - 21.1.1999

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 6-foje jare.
Abono 18 gld. + 3 gld (aerpoŝto)

E-mail de Starto: starto@clavis.cz

TTT de Starto: www.clavis.cz/starto

E-mail de ĈEA: cea@tmet.cz

TTT de ĈEA: www.kuk.cz/cea/

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio,
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%
rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 200 Kč, B 100 Kč, (C
nuligita), D 50 Kč, E 50 Kč, F 4000 Kč, G
130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 20
ECU, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 490 Kč komencantoj,
450 Kč progresintoj. Aliĝoj: Esperanto, p.s.
1069, 111 21 Praha 1

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6,
152 00 Praha, tel. 02/5817732

Sekcioj de ĈEA: infana, junulara, skolta,
pedagogia, katolika, kristana, blindula, medici-
na, scienc-teknika, fervojista, ŝakista, SAT-
amikara, de esperantaj-kolektantoj

Komisionoj de ĈEA: gazetara-informa,
ekzamena

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA: 3330-021/0100,
Komerční banka, Praha 2

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10,
747 05 Opava, tel: 0653/611 823

Vicprezidanto: Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobříčovice, tel. 02.9912201, fakso
02.9912126

Vicprezidanto: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603
00 Brno, tel. 05/4323 3047

Sekretario: Květa Krajíčková, Esperanto, p.s.
1069, 111 21 Praha 1

Komitatano: Lucie Karešová, Tylova 1262,
508 01 Hořice v Podkrkonoší

Komitatano: Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1,
696 62 Strážnice, distr. Hodonín, tel. 0631/332
278, fakso 0631/332 507, vlada_hasala@iol.cz

Komitatano: Zdeněk Heiser, Na Nábřeží

45/25, 736 01 Havířov, tel. 069/6815253

Kontrolgrupo de ĈEA: Ing. Josef Hron,
Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice,
(membrino: Libuše Krejčí)

Kontisto: Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147
00 Praha, tel: (02) 4446 0162

Ĉefdelegito de UEA: Stanislava Chrdlová,
Anglická 878, 252 29 Dobříčovice, tel.
02.9912201, fakso 02.9912126

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724
0690 (nesignitaj artikoloj estas liaj)

Lingva kontrolo: Miroslav Pastrňák

Variabilní symboly pro platby ČES

311 expedice, úhrada koupených knih

604.2 písemné kurzy

604.3 předplatné Starto

604.5 předplatné Internacia Fervojisto

668 dary svazu

694 členské příspěvky ČES

694.1 členské příspěvky UEA

789.1 sekce mládeže

789.10 sekce šachistů

789.11 sekce sběratelů

789.13 Sienca revuo

789.15 ediční fond, Ringo

789.16 subkonta klubů mimo uvedených

789.17 sekce nevidomých

789.19 propagace v reg. tisku

789.3 sekce železničářů

789.7 sekce pedagogů

789.71 ILEI (+ Internacia Pedagogia Revuo)

Variabilní symbol uvádějte na přední straně
poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do
„Zprávy pro příjemce“ napište účel platby.
Upozornění pro majitele účtů u jiných bank!
Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvádějte
nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK
PŘÍBRAM nebo PROCHÁZKA OLOMOUC
apod. Zároveň uveďte i variabilní symbol.
Dojde-li platba s označením „ČESKÝ ESPE-
RANTSKÝ SVAZ“, pak vůbec nevíme, kdo a
proč platí. Takové úhrady účtujeme jako dary
svazu.

ISSN 1212-009X

Niaj literaturistoj

P. J. 1999

Na konci října
oranišť voní hlína
Srdcem projel nůž
Už?

Na konci listopadu
svíček vidíš řadu
Ať shrbená s kosou
marně číhá vzadu

Na konci roku
zase jiskra v oku
Ať naše dny čeká
jen jas do daleka

Hrozny slov zalévané rosou
ať zrají v moudrém sadu

Čestmír Vidman

Novoroční

Jako papír nepotřebný a zmuchlaný
odhodme starosti a bolesti do koše
Radujme se Zas jeden rok je za námi
co měl léky na naše rány

Není jenom čern nebo šed
Paleta duchovního života je pestrá
Jdeš-li nepohodou tmy
Betlémská hvězda na cestu ti svítí

Zapíchni hůl Vyroste strom
Přivez cihly Bude dům
Něco tu po nás pro budoucí musí zbyť
Jiří Karen

P. J. 1999

Fine de oktobro
aromas argilo de plugejoj
Tra koro trairis tranĉilo
Ĉu jam tempas?

Fine de novembro
vi vidas vicon da kandeloj
Ĝibulino kun falĉilo
vane embuskas

Fine de jaro
en la okulo ree fajreroj
En niajn tagojn venu
vasta sereno

Per roso priverŝataj vortoj-vinberoj
maturiĝu en saĝa ĝardeno

Čestmír Vidman

(Esperantigis Josef Rumler)

Novjara

Kvazaŭ paperon senbezonan kaj ĉifitan
ni jetu zorgojn kun doloroj en rubujon
Ni ĝoju Denove pasis jaro
disponanta pri kuraciloj por niaj vundoj

Ne ekzistas sole nigro aŭ grizo
Paletro de la spirita vivo buntas
Se vi iras tra obstakloj de tenebro
la Betlehema stelo prilumas vian vojon

Enpiku bastonon Elkreskos arbo
Alveturigu brikojn Ekstaros domo
Post ni io devas resti por la futuruloj
Jiří Karen

(Esperantigis Miroslav Malovec)

Prosperu la naŭdek naŭa!

Antaŭ nelonge ni ĉiuj travivis jarŝanĝon kaj nia vivo nun realiĝas sub signo de tri naŭoj. Tiujn baldaŭ anstataŭos alia triopo de ciferoj - triopo de nuloj. Kaj jen naskiĝis kerno de problemoj, kiujn oni taksas diverse: iuj opinias ĉi jaron la lasta en la dua miljaro, aliaj kontraŭstaras pruvante, keĝi finiĝos nur en posta jaro. Por ni - esperantistoj - tiom ne gravas, kiam fakte ŝanĝiĝos miljaroj, sed ni - akceptinte la „Kampanjon 2000“ devas kompreni la naŭdeknaŭan kiel la lastan por krei firman bazon por grava elpaŝo al oficialigo de Esperanto kaj ĝia ĝenerala envicigo en vastajn internaciajn kontaktojn.

'99

Ĉiu el ni povas kontribui al tiu strebado, ĉiu povas kontribui al prestiĝo de la internacia lingvo - sed nur per oferema, daŭra kaj serioza ĉiutaga laboro. Oni komencu en la propra loĝloko, en la proksima ĉirkaŭaĵo, inter homoj ĉirkaŭ si. Ĉe ĉiu agado oni konduku prudente kaj racie, ĉar nur tia laboro aperigos rezultojn, kiuj povas konvinki ne verdulojn pri senco kaj praktikeco de nia lingvo.

Al tiu ĉiutaga laboro mi deziras al niaj legantoj senfinan forton kaj neordinarajn ideojn.

VI. Kočvara

Nia Esperanto-muzeo daŭre riĉiĝas...

Registrado de la Esperantaj libroj estas preskaŭ finita kaj komenciĝis ilia komputora prilaboro, kiun ni finos supozeble en la mezo de 1999. Preskaŭ nesolvebla problemo estas prilaboro de gazetoj pro manko de personoj - mi esperas pri helpo de esperantistoj el proksimaj rondetoj.

Ĝis nun ne estas finita klasigo de la heredaĵo de s-ro Mařík (el 12 kestoj restas ankoraŭ 5). Helpas ĉefe la asocia prezidanto Ing. V. Kočvara.

Dokumentojn pri nia movado (afiŝojn, flugfoliojn, invitilojn ktp.) ni koncentras laŭ ilia deven-loko, sed la prilaboro devas ankoraŭ atendi.

Bedaŭrinde nur malmultaj esperantistoj komprenis, kiel gravas konservado de informoj pri nia agado - informoj venas nur sporade.

Septembre ni aranĝis - kunlabore kun la klubo - ekspozicion „Mondo sen interpretistoj“, kiun partoprenis 400 personoj dum 10 tagoj.

Laŭ Jiří Pištora

Al la raporto de J. Pištora mi volas per kelkaj vortoj aldoni informojn pri laboro ligita kun la ordigado de la materialo, kiu daŭre abundigas la kolektaĵojn.

Necesas diri, ke krom la direktoro, kiu devas plenumi plurajn taskojn kaj ne povas dediĉi sin nur al esperantaĵoj, neniuj aliaj en la muzeo regas Esperanton, kio estas kondiĉo por respondeca klasifiko de la materialo, kiu ĉefparte estas en la internacia lingvo. Tamen - ne ĉiu papero estas dokumento

grava por historio de la movado, tial oni devas bone orientiĝi en ĝi sur tereno ne nur enlanda. Sed ĉefe - oni devas por tiu tre interesa laboro havi liberan tempon kaj ankaŭ inklinon. Opiniante, ke mi almenaŭ parte tiujn postulojn plenumas, mi laŭpove kun samideano Pištora kunlaboras kaj jam dum kelkaj tagoj „deĵoris“ aŭ volontulis en la muzea deponejo. Aktuala nunestas prilaboro de la heredaĵo de s-ro Jaroslav Mařík, honora membro de UEA kaj ĈEA, iama ĝenerala sekretario de EA ĈSR, parolisto de la esperanta disaŭdigo de Praha, prezidinto de Praha klubo, estro de iama ĉefa Esperanto-junularo. La postlasaĵo de s-ro Mařík estas lastatempe la plej grava pligrandigo de muzea kolektaĵo. Jam dekomence mi ekadmiris la heredigiton, ĉar liaj interesoj estis pli ampleksaj ol estis sciata. La dekdu grandaj skatoloj estis plenaj de diversaj materialoj, kiuj rilatis ne nur al Esperanto - kvankam tiu plejmultas, sed tie estas ankaŭ diversajoj pri Sudeta problemoj, pri eventoj ĉirkaŭ la jaro 1968, pri Prago ĉiuteme - historio, mitoj, memorindaĵoj ktp., simile pri regiono ĉirkaŭ urbo Benešov, de kie li devenis (naskiĝis en vilaĝo Zahradnice). Sed ankaŭ fakaj materialoj, kiuj lin interesis profesie - patentoj, rubaĵ-problemoj kaj aliaj. La materialoj konsistas el leteroj, presaĵoj, fotografiaĵoj, amaso da eltondaĵoj kaj ĉefe el miloj da malgrandaj kartetoj kun diversaj notoj kaj rimarkoj al temoj de li studataj. Similaj referencoj estas necesa bazo por orientiĝo en studata problemoj por ties aŭtoro, sed por aliaj estas

apenaŭ kompreneblaj kaj utiligeblaj uzeblaj. Tial ili iras korbon escepte de gramatikaĵoj kaj lingvaĵoj - tiujn oni transdonos al nia redaktoro M. Malovec, kiu tiun ĉi kampon prilaboras. Tiu ĉi klasifiko de la materialo, kiu espereble finiĝos antaŭ somera feriado, estas la unua ŝtupo, kiun sekvos pli detala studado. Sed nun estas ĉiu objekto nur envicigita en difinitan sortimenton - laŭ menciitaj agadkampoj de la mortinto - do kreigas stoko Praha klubo, Esperanto en radio, ĉefe movado ĝenerale, personaj aferoj kun riĉa korespondado, movado en unuopaj lokoj en nia lando - temas pri presaĵoj, afiŝoj, invitiloj ktp.

Plua laboro estos por estonteco, kiam oni devas detale tralegi ĉiun pecon kaj fine decidi, kion arkivi pro sia graveco por historio de la movado kaj kio havas nenian valoron. Tion oni devas forĵeti, ĉar ankaŭ la disponebla spaco estas limigita. Tiu plua laboro bezonos ankoraŭ centojn da laborhoroj, kaj volontulaj fortoj. Sed intertempe gravas ordigi amasegon da Esperanto-gazetoj, kiujn la muzeo ricevis de diversaj fontoj. Mi kredas, ke tio povus plenumiĝi ankoraŭ ĉijare.

Kompreneble, ĉiu subteno de nia membraro al la muzeo estas bonvena. Minimume oni sendu ĉiun informon, presaĵon aŭ ĝenerale esperantaĵon al Esperanto-fako de la Urba muzeo en Ĉ. Třebová. Tio estas ĉies kontribuo por estonteco.



Vlko

JUBILEOJ 1/1999

90 jaroj

Žák Jaromír, Brno

85 jaroj

Bulík Miloslav, Mor. Budějovice
Koubský Karel Ing., Praha
Křeček Karel, Červená Lhota

80 jaroj

David Jaroslav, Pustějov
Ryšavý Josef, Uherský Brod
Šostková Marie, Havířov
Vanc Václav RNDr.PhDr. Ing. Ústí n/L

75 jaroj

Kleintová Alena, Benešov
Lokšan Jaroslav, Boletice
Nováková Helena, Kopřivnice
Štnad Otto, Tábor

70 jaroj

Barták Slavomír, Brno
Dufková Alena, Praha 6-Břevnov
Hoffmann Gerhard, Český Těšín
Hrodková Zdena, Žďár n/S
Kociánová Anna, Bystřice p/H
Kočvara Drahomír, Ostrava-Zábřeh
Linhartová Vlasta, Tábor
Minaříková Zdeňka, Praha 5-Lochkov
Rezlerová Věra, Praha 4
Vácha František, Jaroměř
Vernerová Ivuše, Praha 8
Vlach Augustin, Hradec Králové
Zajíčková Jiřina, Nový Bor

60 jaroj

Beneš Ladislav Ing., Kropáčova Vrutice
Čejková Jarmila, Frýdek-Místek
Dvořáková Milada, Humpolec
Hoffmannová Eva, Praha 6-Vokovice
Jílek Josef, Sebranice

Lipčíková Jaroslava, Prostějov-Držovice
Kníchal Oldřich Mgr., Budapest IX
Petrová Jozefína, Lukavec u Hořic

50 jaroj

Dzuňová Anna, Přerov
Osčiatka Emil, Roudno
Wohlmuthová Zuzana, Ostrov n/Ohří

NI KONDOLENCAS

La 3-an de decembro 1998 forpasis Jan Jičínský (nask. 17.5.1915), multjara prezidanto de EK Třebíč, kiu multaj konas el SET Lančov, kie li instruis kaj laboris.

La 11-an de decembro 1998 mortis en aĝo de 69 jaroj Naděžda Nýdlová, nia iama asocia sekretariino en Jilská.

En decembro nin forlasis ankaŭ Antonín Bombionka el Ostrava (nask. 1934).

PROSTĚJOV

90 jaroj de Esperanto-klubo

La klubo preparas por la komenco de la jaro serion da prelegoj en mezlernejoj kaj artikolojn por gazetoj, glumarkon kaj bildkarton. La 4-an de februaro la klubo kunvokas jarkunvenon, kaj

la 22-an de majo aranĝas solenan festenon okaze de sia 90-jariĝo, al kiu estas ĉiuj samideanoj sincere invitataj. Ili vidos ekspozicion, partoprenos senvaligon de memortabulo kaj dancos en amuza vespero kun tombolo. Interesatoj pri tranoktado skribu ĝis la 30-a de aprilo kun poŝtmarko por respondo (estas 30 lokoj). Skribu al:

ESPERANTO KLUBO PROSTĚJOV,
Husovo nám. 85, 796 01 Prostějov.

Ion por pripensado

Ĉu ni devas maljuniĝi?

En pasinta numero de Starto ni povis legi interesan artikoleon pri sukcesa prelego pri E-o al gimnazianoj en Trnové Sviny. Jes, ĉiu eĉ eta ago inter junularo estas meritplena.

Ni komencu inter infanoj: ĉiuj el ni jam scias pri junaj skoltaj el Opava, dudek el ili prezentis sin kiel tre aktivaj en Lančov. Esperebla ŝajnas infangrupo el Okříšky, kiu jam ankaŭ pere de TEJO atingis internaciajn kontaktojn kaj sukcesojn. Kaj se ni rakontus pri tradicia laboro de la infanoj ĉe la klubo en Česká Třebová, mi portus lignon en arbaron.

Bone instruitaj infanoj post nelonga tempo kapablas kompili leterojn helpe de vortaro kaj instruisto. Por ili signifas akcepto de letero el eksterlando grandan fieron, kiun ili reciprokas per plua fervoreco en lernado.

Dum maturiĝo ni perdas iujn eksajn fervorulojn, ĉar gejunuloj nature vagas, serĉas novajn hobiajn, kiuj allogas ilin. Tiun fakton ni devas akceptadi. Eble ili post jaroj revenos al Esp-o, eĉ kun siaj propraj gefiloj.

Sed ŝajnas al mi, ke nur malmultaj infanoj kaj gejunuloj atingas tian lingvonivelon, ke ili kapablas krom leterado veni inter nin kaj buŝe praktiki lingvon, konversacii. Ekzistas eĉ tiuj, kiuj post kelkajara membreco en kluboj, tendaroj, kursoj kaj rondetoj ne korespondas, ne parolas, ilia lingva scipovo estas minimuma. Ili komprenas ĉeeston en la grupo nur kiel amikaran amuzon. Por ili estas Esp-o nur la bunta kuliso, scenejo, teatraĵo, kie ili aktoras mutajn rolojn. Ili bedaŭrinde damaĝe pravas al sia ĉirkaŭaĝo, ke Esp-o estas el ĉiuj lingvoj kvazaŭ la plej malfacila. Ili estas ĉasistoj sen pafilo, fiŝkaptistoj sen fiŝvergo, filatelistoj sen albumo. Kial tiuj „krokodiloj“ diskreditigas nian lingvon kaj entute nin mem?

Ni ne zorgu nur pri senkape fanatika

verbado de kursanoj, el kiuj baldaŭ post nia demagogia parolado la plejmulto fuĝos. Ni ne prelegu nur al eventualaj kursanoj. Ĉiu nia civitano sciu pri Esp-o kaj ĝia utileco. Tio apartenas al ĝenerala klereco de la junularo.

Tial mi ĉiujare efektivas 30-40 interbabiladojn kun studentoj kaj lernantoj de la lastaj klasoj de bazaj lernejoj. Ili akceptas favore ĉi temon en lernejoj horoj de civitana eduko. Allogas ilin malgranda ekspozicieto de tradukitaj libroj, kiujn ili ekkonadas ĉeĥlingve, raraĵoj el ekzotikaj landoj. Kvankam ili ne iĝos esperantistoj, ni ne forgesu, ke en nunaj lernejbekoj sidas estontaj oficistoj, kleruloj, politikistoj, kies favoron, komprenon kaj helpon ni kaj niaj esp-posteuloj bezonos por efektiviĝo de niaj planoj.

Konklude: ĉiu el ni kapablas fari ion por alverŝo de juna sango inter nin. Se ne en la kadro de la tuta regiono aŭ urbo, almenaŭ en niaj familioj kaj parenkaro. Ĉu iu el ni volas, ke ni iĝu iom-post-iome nur klubo de militaj veteranoj?

Jaroslav Žák



INTERNACIA KORESPONDA ADRESARO ESPERANTISTA en Liberec proponas al interesatoj pri korespondado adresojn el la tuta mondo. Novjara kajoro ĵus aperis. Skribu al la redakcio: S-ro R. J. Zvěřina, 5. května 26, CZ-460 01 Liberec.

KORESPONDI DEZIRAS

- Germana esperantisto kolektas ĉiujn ajn kovertojn, kartojn ktp., kiujn vi ricevis dum via longjara korespondado kun diversaj landoj. Precipe de GDR, FRG k. Berlin. Pago garantiata. Ankaŭ interŝanĝo kun kolegoj eblas. La afero daŭre validas. Skribu urĝe al: M. Kirsch, Brandstr. 21, D-04626 SCHMÖLLN, Germanio.

INTERKULTURO

internacia edukprojekto de ILEI

1. Celo: kontribui konkrete al internacia interkultura edukado en lernejoj

2. Partoprenantoj: klasoj de bazaj aŭ mezaj lernejoj en diversaj landoj kaj kontinentoj (aŭ lernejoj Esperanto-kluboj)

3. Agadoj (en klasoj aŭ kluboj)

3.1 uzo de geografia sliparo pri landoj kaj regionoj (ĉiun slipon verkos instruistoj de la koncerna lando), por komparado de landoj kaj kulturoj

3.2 elekto de laborkampoj (ekz. manĝado, vestado, komunikado, lingvoj, lernejoj, ktp.), pri kiuj la klasoj interŝanĝos materiajn dokumentojn kaj kolektos pluajn informojn

3.3 ekspluatado de aliaj taŭgaj ekzistantaj lernomaterialoj pri vivmanieroj kaj kulturoj ĉe lernado de Esperanto por realigi la suprajn agadojn

3.4 produktado de finaj materialoj (tekstoj, grafikaĵoj, bildoj, sonbendoj) pri la studitaj temoj, por internacia ekspozicio

4. Komunik-kanaloj: en la komputila monda Interreto kreos medion, nomatan **Kvazaŭa Lernejo** (= Virtuala Lernejo), kies klasoj estos la klasoj de la projekto Interkulturo, disaj tra la mondo. En tiu Interreta medio la klasoj povos konsulti lernomaterialojn, ekzerciĝi en la lingvo Esperanto, komuniki inter si, ekspozicii siajn produktaĵojn ktp.

4.1 por tiuj lernejoj, kiuj jam havas aliron al Interreto, ili povos rekte uzi la sistemon, elprenante kaj almetante materialojn

4.2 por tiuj klasoj, kiuj nun ankoraŭ ne

havas tiajn eblecojn, ILEI provizus paperajn kopiojn, sendatajn per tradicia papera poŝto.

Rimarkigo de la redakcio: la redaktoro de Starto, kiel funkciulo de la ĉefa ILEI-sekcio kaj retano povas helpi ĉe Interreta komunikado.

Serĉado de ekzerc-produktantoj

En la Pedagogia Eksperimentejo de Triĝ Roma Universitato ni estas konstruantoj Interretan Lingvan Laborejon (ILL), por trejni la lingvajn kapablojn de E-instruistoj.

Nun ni planas la strukturon de ILL, kiu antaŭvidas multajn ekzerco-tipojn pri la parola kaj la skriba lingvo, krom konsultejoj de lingvaj materialoj. Temas interalie pri: teksto-kompreno, priskribado, diktado, teksto-kompletigo, signif-elekto, sintaksa transformado, ktp. ktp. Por ĉiu ekzerco-tipo ni mem pretigos kelkajn prototipojn por provi la sistemon. Poste, por satigi la instruantojn kaj komputan strukturon de ILL, ni bezonos taŭgan nombron da aliaj divers-nivelaj lingvaj ekzercoj por ĉiu tipo. Tio ja superas niajn modestajn homajn fortojn. Ĉu troviĝas kunlaboremuloj, kapablaj pretigi kromajn ekzercaĵojn laŭ donita modelo?

Rimarkindas, ke la enhavo de ILL estas ĉiom esperantlingva; tial ne gravas la denaska lingvo de la ekzerc-aŭtoroj. Eĉ male: bonvenos alilandaj kontribuoj.

Por tia kunlaboro, retaneco preferindas, sed ne nepras.

Fidante la mondan solidarecon, amike Maŭro La Torre, m.latorre@uniroma3.it

Informoj el la komitato de ĈEA

La lasta komitatkunsido en la jam finiĝinta jaro okazis fine de novembro en Brno - sed jam post redaktotino de la 5-6-a numero de Starto. Ĝi komenciĝis kiel kutime kun debato pri mastrumado de la asocio. Plue enprogramiĝis organizaj aferoj, kiuj ĉifoje prenis ĉefan tempon. Oni priparolis enhavon kaj rezulton de la asocia konferenco en Jablonec kaj la konstituan sesion de la sekcio de SAT-amikoj en ĈEA - pri ambaŭ eventoj estis niaj legantoj jam informitaj. Plue oni parolis pri la sciencteknika sekcio, kiu nun jam longe ne funkcias - atendita instigo al reaktivigo pere de KAEST, kiu sukcese realiĝis oktobre en Prago, ne venis. Afero do restis solvenda por respondeculo pri sekcioj. La komitato ankaŭ devis okupiĝi pri situacio en la kontrolgrupo de ĈEA post ekzigo de sino J. Holcová, kiu estris ĝin. Estis akceptite, ke pluan respondecon transprenos s-ano inĝ. Jos. Hron, ĝisnuna membro de la grupo. Al li la membroj direktu siajn eventualajn plendojn en la asociaj problemoj.

La ĉefa temo tamen restis preparoj de la 9-a landa kongreso, kiu okazu ĉijare. La elektokomisiono jam eklaboris kaj ĝi informis la komitaton pri siaj unuaj paŝoj kaj laborplano por trovi kandidatojn por venontaj asociaj gvidorganoj. Proponoj pri loko kaj dato de la kongreso estas aktuale esplorataj.

Pluaj programeroj de la kunsido rilatis ĉefe al kurantaj aferoj. Inter tiuj elstaris agado de kelkaj grupoj, nome oni alte

aprezis sukceson de esperantistoj el Přerov, kiu lige kun omaĝo de 75-jariĝo de la loka organizata movado iniciatis inaŭguron de memortabulo al pioniroj de la landa movado - J. Krumpohlc kaj Th. Čejka. Estis ankaŭ traktite pri diversaj iniciatoj kaj pri la preparata paroliga kurso (5.-7. 3. 99).

Meze de januaro la komitato kunvenis en Prago por sia unua ĉijara kunveno. La atento estis dediĉita al ĉijaraj aranĝoj (paroliga kurso en Praha, SAT-kongreso kaj ILEI-konferenco en Karlovy Vary, medicinista kongreso UMEA en Opava kaj ĉefe al nia asocia kongreso aŭtune.) Josef Cink relaboris kaj modernigis sian Korespondan kurson, por ke ni povu proponi al la publiko modernan formon de la instruado.

V. Kočvara

La 12-a IMEK prepariĝas!



Universala Medicina Esp-Asocio apogata de ĈEA okazigas ĉijare sian 12-a konferencon en Ĉeĥio. Ĝi efektiviĝos en la tagoj

24.7.-29.7.1999 en urbo Opava. La alloga programo de la konferenco enhavas fakajn prelegojn, ekskursojn, amikajn vesperojn, primovadajn diskutojn. Ĉeestos medicinistaj fakuloj enlandaj kaj eksterlandaj, medicinaj lekciistoj, sanitaristoj. La organiza komitato preparas agrablan loĝigon por moderaĵoj, la urbo mem ofertas vicon da vidindaĵoj.

Interesiĝantoj pri tiu ĉi interesa kaj grava faka renkontiĝo turnu sin al MUDr. Eva Kopečná, Pekařská 84 747 05 Opava 5, tel.: 0653-219086

Novaj verkoj de Jiří Karen

Nia ŝatata poeto estis envicigita en la enciklopedion WHO'S WHO / KDO JE KDO (*KIU ESTAS KIU en la Ĉeĥa respubliko fine de la 20-a jarcento - 5000 biografiaj artikoloj de plej gravaj personoj*), kie li ne sekretigas, ke li kreas ankaŭ en Esperanto. La eldonejo Georgetown (Mikulovská 1, 628 00 Brno) eldonis fine de 1998 lian poemaron *Potichu a šeptem* (*Mallaŭte kaj flustre, 49 Kĉ*), elekton de ĝis nun ne publikigitaj poemoj, kie en supervido de lia verkaro ne mankas libroj esperantigitaj de Jiří Kořínek (*Flugilhava ŝtono, 1985*) kaj Rikardo Ŝulco (*Antaŭ la naŭa ondo, 1994*). La libron recenzis en gazetaro Oldřich Rafaj. La 57 poemoj estis prenitaj el kajeroj maŝinskribaj, kiujn la aŭtoro verkas por si kaj siaj amikoj. Inter la lastaj kajeroj estis ne nur ĉeĥlingvaj (*Anděl s jedním křídlem, Don Quijote v nás, Křeslo pro snivé hosty ze vzdálených časů, Básník je cvok, Malý poetický slovník - Angélo kun unu flugilo, Don Quijote en ni, Fotelo por revemaj gastoj el malproksimaj tempoj, Poeto estas freneza kapo, Malgranda poetisma vortaro*), sed aperis ankaŭ ses esperantlingvaj kajeroj **Kantoj de vaganto sur planedo Ĝoja Ĝojmalo**. Ĉar la verkaron de Jiří Karen konservas la Muzeo de la Ĉeĥa Literatura, penetras tien ankaŭ Esperanto.

La amikoj de lia poezio povas ricevi la novan poemaron *Potichu a šeptem* rekte ĉe la aŭtoro kontraŭ 8 poŝtmarkoj po 5 Kĉ senditaj en letero al lia adreso Jiří Karen, Počernická 86, 108 00 Praha.

Vortludoj de David Sláva

Se vi volas testi vian lingvoscion, provu kelkajn ludojn de nia samideano el Pustějov.

Elektu la ĝustan vorton el la du proponitaj:

1. Inter poŝtoficisto kaj kliento estas *septo / ĝiceto*. 2. Trajno haltas ĉe la unua *perono / kajo*. 3. Bienmastro *falčas / rikoltas* terpomojn. 4. En urbo oni konstruas *padojn / bermojn* por biciklistoj. 5. Hundo *bojas / jelpas* al ĉiu fremdulo. 6. Dum dormo li *ronkas / anhelas*. 7. Maljunulo ricevas *emeriton / pension*. 8. Denove oni altigis la *biletprezon / veturprezon*.

Solvoj:

1. ĝiceto (*septo* = maldika mureto, kutime ligna); 2. kajo (*perono* = ŝtuparo antaŭ domporo); 3. rikoltas (*falči* = detranĉi herbon aŭ grenon); 4. pado (*bermo* = irejo apud fervojo aŭ kanalo); 5. bojas (*jelpi* = ekkrii pro doloro); 6. ronkas (*anheli* = malfacile spiri); 7. pension (*emerito* = pensiulo); 8. veturprezon (*oni ne pagas biletan, sed veturon*).

TERMINOJ PRI LIBROTENADO

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) publikigis projekton de librotena terminaro, kiun ellaboris nia asociano Josef Mendl el Milevsko.

El Esperanto en la ĉeĥan

En la ĉeĥa faka gazeto Ateliér 5/6 1998 (4.12.1998) aperis artikolo pri mezurado de malrapida aerfluo en ĉambroj pere de sapvezikoj, kiun el Esperanto tradukis ing. Jan Werner.

Forlasis nin Eva Seemannová

AKTORINO

Nur kiam venas la vespero
kaj pale ombras mondon,
mi iras vivi - kiam la kurteno
malfermas horizonton de la songa sfero,
mi sentas vivdonantan ondon,
ne scias kien, tamen fluas sen reteno.

Kaj ĉion, kio sangas en la koro -
trankvilon, amon kaj dolorojn ĉiajn -
forĵetas la vesper' en nerevenon.
Por ies viv' en luma reflektoro
forĝas mi pasion kaj karesojn viajn
kaj ne memoras vian ĉirkaŭprenon.

Ne voku min al via kor' amanta -
mi estas ja nur aktorino ...
Min lasu vivi du vesperajn horojn,
humila esti, esti peke vanta,
ne plendu ja pro la inklino -
mi ploras jam nur fremdajn plorojn.

Mi vivas kaj vi songas nur -
mi vivas febre pro parfum' de floro
kaj pro ĉifonoj de la strat-bubin',
pro la princina krono kaj purpur',
milfoje mortas pro honoro,
milfoje amas, sed ne vin ...

Ne skribu do pri amo via -
vi vivas kaj mi ludas nur.
Mi naĝas en sovaĝa onda flu',
per fremda amo estas mi ebria -
ne sendu florojn - mi ne flaras en
obskur'
kaj skribon morgaŭ ne komprenos plu.

Eva Suchardová-Seemannová

Ĵaŭde la 21-an de januaro 1999 atendite forlasis nin honora membrino de ĈEA (1979) kaj UEA (1996), konata artistino Eva Seemannová, antaŭe Suchardová. Ŝi naskiĝis 21.3.1920 en Praha. Profesie ŝi estis aktorino, kiu tutan vivon aktivis en ĉeĥa teatra arto. Post sia esperantistigo en 1946 ŝi dediĉis gravan parton de sia arto ankaŭ al Esperantujo. Ŝi komencis per verkado de poemoj, kiuj estis kelkfoje premiitaj en Belartaj konkursoj de UEA. Tamen ŝiaj plej gravaj meritoj ligiĝas al Esperanto-teatro. En 1954 ŝi kun Antonín Seemann fondis ĉe Praga Esperanto-klubo artisman kolektivon, kiu poste ricevis egan subtenon de J. Baghy, kies nomon ĝi poste transprenis kiel „Verda ĉaro de Julio Baghy“. Kun pluraj membroj ĝi komencis sian agadon per deklamado kaj mallongaj teatraĵoj, kiuj poste maturiĝis en tutvesperaj prezentoj de famaj dramaj verkoj: Maryša de fratoj Mrštíci, Pigmaliono de G. B. Shaw, Nora de Ibsen, Legendo pri amo de Nazim Hikmet, kiu la prezenton eĉ mem ĉeestis kaj alte aprezis. La grupo surscenigis la verkojn en la praga teatro „Malá scéna“ (= Malgranda scenejo), kiu tiam fariĝis renkontejo de esperantistaj teatroamantoj. La Pigmaliono estis ludita ankaŭ en Varsovio dum la 44-a UK

kaj la trimilkapa ĉeestantaro varmege aplaudis la prezenton, sed ĉefe samideaninon Eva Seemannová, kiu senkonkurence ĉefrolis. Sed ŝia kontribuo al sukcesoj de la „Verda ĉaro de J. Baghy“ estas ankoraŭ pli vasta, ĉar ŝi la verkojn ankaŭ tradukis. La sukcesojn de la teatra grupo ĉesigis perdo de la scenejo kaj posta disigo de la membroj. Sed ankaŭ poste Eva Seemannová ne laciĝis kaj preparis kaj mem prezentis nekalkuleblan nombron de artaj programoj, kiujn ŝi prezentis multfoje dum enlandaj renkontiĝoj, sed ankaŭ eksterlande

pere de vojsnuro tra Esperantaj kluboj. Ankaŭ ĉijare oni kredis vidi ŝin en programo de la 9-a kongreso de ĈEA, bedaŭrinde, ŝi jam ne plu povos regali esperantistojn per sia arto.

La lastan adiaŭon kun Eva Seemannová, kiu okazis laŭ deziro de la familio nur kun muzika akompano sen vortoj, partoprenis ankaŭ multaj esperantistoj. Eva Seemannová forpasis, sed ŝia arto restos en niaj koroj.

V.K.

Prší

Koncem ledna sníh se ztrácí
I příroda pláče za poutníci
pokorně se stěhující
od štace k štaci

Zná její pohled milující
S očima Šrámků nebo Čapeků
šťastně se po ní toulající
Za kapkou kapka

tvář ti smáčí
Jdem s tebou tvoji posluchači
Prší I příroda truchlí
s námi v pláči

Čestmír Vidman 26.1.1999

Pluvas


Januarfine la neĝo malaperas
Eĉ la naturo priploras migrantinon
kiu sin humile trenas
de publiko al publiko.

Ĝi konas ŝian rigardon amantan
Kun okuloj de Šrámek aŭ Čapek
feliĉe pejzaĝon travaganta
Post guto gutoj

vizaĝon vian lavas
Ni akompanas vin viaj spektantoj
Pluvas Eĉ naturon tristo trafas
kun ni en larmoj

Čestmír Vidman 26.1.1999

33-a ILEI KONFERENCO KARLOVY VARY 1999-08-07/13



ILEI = Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj

ILEI-konference

je tradiční odborné setkání učitelů esperanta, mající za cíl nejen vyslechnout zajímavé přednášky, ale zejména si neformálně vyměnit zkušenosti jak z oblasti výuky esperanta, tak i obtížné problematiky získávání nových adeptů a udržení jejich zájmu o esperanto po ukončení kurzu.

Je samozřejmé, že se konference mohou zúčastnit i neučitelé, zajímaví se o danou problematiku.

ILEI-Gimnazio:

v mezinárodním gymnáziu, které probíhá paralelně s konferencí po celý týden, se žáci ve věku 13 až 16 let mohou pomocí esperanta dozvědět mnoho užitečných věcí z literatury, historie, zeměpisu, hudby a dalších předmětů, kromě toho budou společně chodit na vycházky a v zajímavém mezinárodním prostředí si tak zábavnou formou rozšíří a upevní své jazykové znalosti.

Pozor: na gymnáziu se nevyučuje esperanto, ale pomocí esperanta ostatní předměty, proto se mohou přihlásit pouze zájemci již dobře ovládající esperanto!

Kandidáti na prezentaci zajímavých přednášek nebo na místa učitelů v gymnáziu (s uvedením oboru / předmětu), hlašte se ihned na adresu: s-ino Jennifer Bishop, 39 Hill Street, Hawthorn, AU-Victoria 3122, Austrálie (letecky!) E-mail: <esperanto@education.monash.edu.au>

Místo konání:

Konference se bude konat v Domově mládeže Karlovy Vary - Drahovice (kde se bude též bydlet a kde bude společně stravování) a v aule sousedního Gymnázia. Objekt se nachází v blízkosti lázeňského centra, kam povede nedělní společná procházka s výkladem v esperantu.

Pro ty, kteří dají přednost individuálnímu stravování:

V nejbližším okolí DM je potravinové nákupní centrum i restaurace nabízející levné pokrmy (bývá však dosti zakouřená), přímo v DM jsou automaty nabízející teplé i studené nápoje.

Uvedené ceny v Kč jsou dotované a platí jen pro občany ČR a SR:

Kongresové poplatky (v Kč):

Kategorie:	platba do:	99-03-31	99-05-31	později
člen ILEI		300	400	500
nečlen ILEI		500	600	700
účastník gymnázia (13 - 16 let)		0	100	200
mládež do 30 let, invalida		100	200	300

Jako účastník gymnázia se může přihlásit každý mládežník ve věku od 13 do 16 let za předpokladu, že dobře ovládá esperanto.

Ceny ubytování. Rabatované ceny jen pro kategorii B (umyvadlo s teplou a studenou vodou na pokoji, WC a sprchy přes chodbu):

Pokud si zvolíte ubytování ve dvou- či třílůžkovém pokoji a nezbyde-li pro Vás spolubydlící, doplatíte rozdíl v ceně při prezentaci.

Kategorie	1 místo v pokoji	Kč/noc:
B	jednolůžkovém	180
	dvoulůžkovém	130
	třílůžkovém	120

Stravování (ceny v Kč)

je možno si objednat jen z níže uvedených možností

Jen snídaně (celkem 6x)	240.-
10 hlavních tříchodových jídel (bez oběda v „ekskursa tago“):	840.-
Plná penze (bez oběda v „ekskursa tago“):	1080.-

Výlet během konference:

Celodenní autobusový výlet: Mariánské Lázně, hrad Locket, včetně vstupu na hrad (mj. expozice českých strašidel) a oběda 750.-

Přímá autobusová doprava pro účastníky UK:

Od kongresového centra v Berlíně k DM v Karlových Varech 1100.-

Přihláška na 33. konferenci ILEI, Karlovy Vary 1999-08-07/13
(Pouze pro občany ČR a SR)

Po vyplnění zašlete přihlášku na adresu:

KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice

Příjmení: Jméno:

Kompletní adresa:

Tel: Fax: E-mail: Dat. nar.:

Číslo OP: Vegetarián: ano / ne

Objednávám a současně platím: Kč

Konferenční poplatek

Noclehy vlůžkovém pokoji typu B, tj. 6 xKč =

(V případě 2 či 3-lůžkového pokoje s)

Jídla: jen snídaně / kompletní

Celodenní autobusový výlet Mariánské Lázně - Locket
